Vi lernos, kaj praktikos

Tempordo II

Dum BEKUNU vi lernis kaj praktikis tempordon per la sekvaj tempindikiloj:

Je la sepa mi vekiĝis.
Poste mi ellitiĝis kaj iris al la banĉambro.
Post tio mi matenmanĝis.
Dudek minutojn poste, mi prenis aŭtobuson kaj iris al mia laborejo.
Mi laboris inter la oka kaj la dek dua.
Mi manĝis de la dek dua ĝis la dek tria pli malpli.
Post la manĝo mi rekomencis labori.
Tiam mi tajpis leteron por la estro. KTP.

Nun ni lernos kaj praktikos aliajn tempindikilojn, kaj ni uzos subpropoziciojn de tempo. Jen kelkaj ekzemploj:

Kiam mi estis en Parizo lastjare, mi vizitis la Ejfelturon.
Dum mi matenmanĝis hodiaŭ, mi aŭskultis la novaĵojn de la radio.
Post kiam li rigardis la televidan futbalmatĉon, li malŝaltis la televidilon.
Antaŭ ol vojaĝi al Usono, Sinjoro Rodrigo aĉetis la aviadilan bileton.
Antaŭ ol li vojaĝis al Usono, Sinjoro Medrano aĉetis vojaĝĉekojn.

Ekzerco: plenumu la sekvajn spacojn per *dum*, *post kiam*, kaj *antaŭ ol*.

1 _____ mi vojaĝis per trajno al Parizo, ni parolis france kun la vojaĝanto kiu sidis apud mi.

2 _____ mi revenis hejmen, mi hejtis la fornon kaj enmetis la kokinaĵon.

3 _____ lasi la oficejon, mi malŝaltis mian komputilon.

4 _____ Paŭlo kaj Maria geedziĝis, ili aĉetis orajn ringojn.

5 Mi ekprelegos _____ ĉiuj ĉeestantoj sidiĝos.

6 _____ foriri, ne forgesu vian pluvombrelon!